



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 2 No. 2

Official Organ of the Esperanto League for North America

March-April, 1954

JOIN NOW! 1954 CONGRESS



Pictured here is the Administration Building of Westminster Choir College, site of this year's ELNA Kongreso. Located at Princeton, New Jersey, the College is a separate entity from Princeton University, and is dedicated to the belief that the ultimate purpose of music is to serve God; and its own pur-

pose is to prepare its students to be "ministers of music". The College is renowned as the home of the famous Westminster Choir, and its graduates are in such demand all over the United States that prospective employers have outnumbered them as much as 30 to one.

During the Congress (July 9, 10, 11) food and lodging will be provided by the College at a cost of \$11 per person. Sign up now by sending your registration fee (\$3 per person) to Local Congress Committee Chairman Howard G. Borden, 110 S. Overbrook Ave., Trenton 8, N. J.

Published in Tacoma, Wash., by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ. Subscription free to members. Other rates:
NON-MEMBERS: \$1.75 per year.
GIFT SUBSCRIPTIONS: *Members* may purchase gift subscriptions, at 30 cents per year, for schools, libraries, eminent persons, etc. The Review reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.
EXTRA COPIES (must be ordered before printing): 30 of one issue for \$1 to members only.

MEMBERSHIP	DUES
Regular Member	\$3.00
Supporting Member	\$5.00
Patron	\$10.00
Life Member	\$50.00
Man and wife (Regular Members)	\$4.00
(to receive only one copy of publications, etc.)	

OFFICERS OF ELNA

President	
Gilbert Nickel,	204 Harding Avenue, Silview 4, Del.
Vice-President	
John L. Lewine,	52 Riverside Drive, New York 4, N. Y.
General Secretary	
Louis Dormont,	123 East 35th Street, Brooklyn 3, N. Y.
Financial Secretary	
Conrad Fisher,	R. F. D. 1 Meadville, Pa.
Treasurer	
Edward W. Pharo, Jr.,	638 E. Rosalie St., Philadelphia 20, Pa.
Chairman, Executive Board	
F.R. Carlson,	2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.
Editor, Official Organ	
D. B. Richardson	6205 So. Prospect Tacoma 9, Wash.



ADVERTISE IN THE REVIEW

One page.....	\$20.00
Half page.....	10.00
Quarter page.....	5.00
One column.....	7.00
Half column.....	3.50
Quarter column.....	1.75
Eighth column (7 lines) or less..	1.00

Extra charge may be made for cutsof special material which increases cost.

COMMITTEES OF ELNA

Finance	
George E. Wagner,	403 E. North St., Tampa, Fla.
Organization	
Armin F. Doneis,	P.O. Box 105, Pharr, Texas
Roan Orloff,	31 Nahanton St., Box 18, Newton Center 59, Mass.
Publicity	
Adrian Hughes,	476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Ore.
Helene Wolff,	2944 Clay St., San Francisco, Cal.
Education	
W.G. Adams,	Kingston, Wash.
G. G. Iggers.	Philander Smith College, Little Rock, Ark.
John Bovit,	132 East Broad St., Westfield, N.J.

Anyone who can help in the work of one of these committees, or who wants help on local problems, is requested to write to the first name listed under the committee concerned.



ELNA BUDGET

January to August inclusive, 1954.

RECEIPTS	
Balance December 31, 1953	\$291.00
Dues receivable	489.00
Review subscriptions (estimate)	20.00
25% Book sales (Turner)	20.00
Total	\$820.00
for eight months	\$546.67

DISBURSEMENTS

President's office	\$10.00
General Secretary's office	25.00
Treasurer's office	15.00
Estrarestro's office	15.00
Financial Secretary's office	10.00
Review (4 issues at \$60)	240.00
Printing stationery	25.00
Committees:	
Membership and Organization	17.00
Educational	25.00
Publicity	10.00
Finance	5.00
Balance to cover additional items or increases voted by Estraro	134.67
Total	\$546.67



RULINGS by the PRESIDENT

The President shall not be held responsible for split infinitives introduced into his rulings by the printer.

DECISIONS of the ESTRARO

1. Approved advertising rates for the Review (published elsewhere in this issue).
2. Approved proposal of Westminster Choir College for 1954 Congress.
3. Approved the budget (published elsewhere in this issue).
4. Approved proposed amendments (published elsewhere in this issue).
5. Members may purchase extra copies of the Review at 15 for 60 cents or 30 for \$1, if ordered before printing.
6. Gift subscriptions to the Review for Esperantists in other countries will be accepted on the same basis as for schools, libraries, etc.



PROPOSED AMENDMENTS to the Constitution of ELNA

(Numbers indicate paragraphs to be amended. (Congress) indicates amendment proposed by 1953 Congress.)

The Executive Committee recommends that the office of Financial Secretary be abolished, as provided in the amendment to Paragraph 401, which would automatically result in rejection of certain amendments relating to the duties, term, etc. of the Financial Secretary. It is believed that the duplication involved in having both a Treasurer and Financial Secretary is unnecessary and leads to delays in handling the financial affairs of the League. The fact that the Treasurer is bonded is sufficient guarantee that the funds of the League are protected.

It is further recommended that the amendment to Paragraph 207 as submitted by the Congress be approved with the change of the word "shall" to "may" (before "suspend"). As submitted, the amendment makes it mandatory on the Executive Committee to suspend a member (and consequently an officer) against whom five members may present charges, no matter how trivial or baseless such charges may be.

101 (Congress): To be amended by adding the word "Incorporated" after the name of the League.

207 (Congress): To be amended to read "The Executive Committee shall suspend the membership of any member against whom charges shall have been presented in accordance with Par. 208. They shall present the issue for final disposal at the subsequent Congress."

208 (Congress): Add "Only the Congress can expel a member. A two-thirds vote is required for expulsion."

208-d (Congress): Add "Any expelled member shall have the right of appeal within 60 days to the referendum vote of the membership. The expelled member shall bear the cost of preparation of the statement in his defense, such statement to be limited to 1000 words or to the length of the material presented against him, whichever is greater. The defense statement shall be mailed at the expense of the League, with the referendum ballot and the sustaining statement."

401: To be amended by eliminating the provision for a Financial Secretary.

401 (Congress): To be amended by adding "The officers elected at any Congress shall take office immediately after the close of that Congress."

402: To be amended by eliminating the reference to Financial Secretary.

403: To be amended by providing that the President shall serve for three years; provided that the President's office shall be filled at the 1954 election.

407 (Congress): To be amended by adding "The Financial Secretary shall serve for three years; however, the first Secretary shall serve until the close of the 1955 Congress."

408 (Congress): To be amended by inserting "Shall serve for three years; however, the first Treasurer shall serve until the close of the 1955 Congress."

410: To be amended by adding the following: "Following each election they shall choose from among their members a Chairman. They shall establish from time to time the necessary regulations and procedures for the conduct of their duties."

(Continued on page 12)



Esperanto display at the Central Public Library, Seattle, February 1-28

ESPERANTO IN NORTH AMERICA

News-notes from around the United States and Canada

Esperanto - Speaking Family Honored on Silver Anniversary

The most famous Esperanto family in the United States was honored Jan. 24 by members of the Esperanto Club of Los Angeles when Ges-roj Charles-Chomette celebrated their 25th wedding anniversary. S-ano Chomette met his wife, Germaine, at the 20th Universala Kongreso in Antwerp in 1928; he was French, she was Belgian, and when they married Esperanto became their everyday language. The Chomettes' two daughters, Dianto and Lilio, have spoken Esperanto from birth.

Our congratulations to the Chomettes and best wishes for many more years of happiness and of fruitful work for Esperanto.

NEW YORK OFFICERS NAMED

At its February 6 meeting the New York Esperanto Society elected the following officers for the new year: John L. Lewine, President; Frances Leshner, Secretary; and J. A. Clarke, Vice President. Marion Topham and Dora Marroonian were named to the Program Committee.

After the election Dr. Alfonso Lomo, of the University of Madrid, lectured on the subject of participial verb forms in Esperanto. Benjamin Reich presented a discussion on number puzzles.

As usual, the meeting was followed by an informal get-together—lasting far into the night—at a nearby restaurant.

such delicacies as: *irlanda verda salato*, *svedaj viandaj buloj*, ĉina "Foo Yong", *meksikaj tamaloj*, *italaj spaghetoj*, *havaĵaj pampelmoj*, *turka kafo*, *dana fruktosupo*, and many more.

During the program the following founders of the Esperanto movement in Northern California were honored: Mr. H. E. Dillinger, Placerville; Mr. Carpenter; Miss Helene Wolff, San Francisco; and Miss Ida Belle Craig, Sacramento.

Nanev Feted in Seattle

S-ano Nuni Nanev, the famous Bulgarian operatic tenor and noted Esperantist, appeared at the Seattle Metropolitan Theatre on Feb. 13. The audience was most enthusiastic, and both Seattle newspapers reported the event with highest praise for Nanev's artistry (including excellent publicity for Esperanto). The previous day Nanev was interviewed over a major television station.

Among the many songs from many lands chosen for the program was the Cradle Song, by Brahms, which S-ano Nanev sang in Esperanto.

After the concert, S-ano Nanev was honored by Seattle Esperantists at the home of Jay Berry, President of the local club.

S-ano Nanev has compiled a large collection of Esperanto translations of classical and folk songs from all over the world. If you are interested, write to: S-ano Nuni Nanev, 664 Woodbine Ave., Toronto, Ontario, Canada.

North California Groups Meet in Sacramento

The first regional meeting of the Esperanto groups of Northern California took place Sunday, March 7 in Sacramento at the home of Ges-roj John Carpenter. Esperantists from Sacramento, San Francisco and Placerville attended. To give the occasion a real global atmosphere, the ladies wore genuine costumes of various countries—a colorful picture! Also the pot-luck dinner was "internacia" and included



S-ano Nuni Nanev with (left) Duane Walter, Vincent Griffeth, (right) Ferd Carlson, Jay Berry

ESPERANTO ★ TUTMONDE

laŭ arango kun HEROLDO DE ESPERANTO

Kursoj por Esperanto-vidantoj.

Estas konata fakto en multaj landoj, ke mankas personoj kun la neceso sperto pri la gvidado de la diversaj branĉoj de la Esperanto-movado. Tial oni ofte devas elekti en la estrarojn de la grupoj kaj eĉ de landaj asocioj senspertajn homojn, kiuj devas unue uzi longan tempon por studi la funkciadon de la movado, antaŭ ol ili povas efike eklabori. Okazas ankaŭ, ke la pli malpli hazardaj elektitaj personoj ne havas la necesajn ecojn por fariĝi vere efikaj gvidantoj de la movado. Same estas, kiam oni serĉas personon por gvidado de kurso, studrondo, aŭ por estrado de iu administrata aŭ alia aparta fakto (gazetara servo k.s.m.).

La jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo 1953 en Narvik studis ĉi tiun problemon kaj decidis, ke oni klopodu starigi kursojn por Esperanto-vidantoj. Supozante, ke tiaj studkursoj interesas ne nur norvegojn, ni decidis aranĝi la kursojn sur pli internacia bazo. La estraro de NEL tial interkonsentis kun s-ro L. Friis, ke tiaj kursoj okazu en la kadro de lia kursoserio en *Elsinoro* (Helsingör), la 17.-24.7.1954. Okazos jenaj kursoj:

1. Prepara kurso por Esperanto-instruistoj laŭ la Cseh-metodo kaj laŭ lernolibro. Tiun kurson gvidos s-ro T. Morariu.

2. Kurso por Esperanto-vidantoj, kie oni studos detale la laboron de lokaj grupoj kaj de tutlandaj movadoj el ĉiuj flankoj, inkluzive de administrado, kaj ne nur la laboron de estraroj, sed ankaŭ de apartaj fakoj. Partopreni povos ĉiu, kiu interesiĝas pri pli efika gvidado de la Esperanto-movado. Tiun kurson gvidos verŝajne s-roj Johan H. Rosbach (klublaboro) kaj C. Stöp-Bowitz, prez. de NEL (tutlanda laboro).

3. Krome ni klopodas starigi dum la esperantista libertempado en *Lofthus*, Norvegujo, kursojn por gvidantoj de studrondoj, ankaŭ sub gvidado de s-ro Johan H. Rosbach.

La aranĝoj estas eksperimenta efektivaĵo de nova ideo kun la celo krei kapablajn gvidantojn de nia movado. Mi rekomendas al ĉiu serioza esperantisto, kiu jam havas spertojn pri la gvidado de iu flanko de la movado, aŭ kiu estas preta partopreni en la gvidado de la movado estonte, al ĉiu kiu jam havas gvidan oficon ĉu en loka, ĉu en landa, ĉu en tutmonda movado, aŭ kiu estas preta akcepti tian oficon, partopreni en la kursoj. Ne femos pri instruado sed pri komuna studado de la problemoj; ĉiu povos kontribui laŭ siaj spertoj kaj ideoj, kaj ĉiu povos lerni.

(Vidu cetera la anoncojn de s-ro Friis kaj de la Lofthus-aranĝantoj.)

C. STOP-BOWITZ.

La 10-a TEJO-Kongreso

okazos de la 24-a ĝis la 31-a de julio en la konata radio-urbo Hilversum. La kongreso estas „Sportpark“, la sportkonstruaĵo ĉe la malgranda stadiono Soestdijkersstraatweg. Ĝi situas en beleaga ĉirkaŭaĵo, belegaj arbaroj, vastaj erikejoj ktp. Nia programo estas varia kaj interesa. Aligilo ricevebla ĉe la Loka Kongresa Komitato, 10-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Lobeliastraat 4, Hilversum, Nederlando.



Haarlem: 2000!

Adreso: 39-a Universala Kongreso de Esperanto, Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando.

Dato: 31 julio—7 aŭg. 1954.

Studentoj rajtas aliĝi al la kongreso je la sama tarifo kiel junuloj. La aliĝilon devas akompani atesto de la fakultato de la studento.

Antaŭkongreso en Antverpeno: Ĝi okazos dum la kvar lastaj tagoj de julio (28-31) kaj enhavos i.a. balon, vesperfeston kun teatraĵeto, kantoj kaj skeĉoj, oficialan inaŭguron de Dr. Zamenhofstrato. ktp. Sabaton antaŭtagmeze la partoprenantoj komune vojaĝos al Haarlem. Kongreskoto 50 b.f.k. Adreso de la sekretario: H. Sielens, Houwerstr. 12, Antwerpen; de la kasisto: A. Pittoors, Deurne (poŝtkonto 40.89.41).

„Mi antaŭvidas, ke antaŭ la fino de marto ni atingos la 2000,“ skribis al ni la Konstanta Kongresa Sekretario, s-ano Mason Stuttard, la 20-an de marto. En tiu tago estis enskribitaj jam 1880 kongresanoj el 27 landoj; sed krome estis ricevitaj 80-90 aliĝiloj de personoj, kies pago ankoraŭ ne estis registrita. Post la fino de marto la LKK do verŝajne ne plu akceptos aliĝojn.

Helsingör

De la 17-a ĝis 24-a de Julio

okazos en la Internacia Alternejo internaciaj feriaj kursoj: daŭriga, konversacia, prepara por Esperanto-instruistoj (Cseh- kaj lernolibra metodoj), por Esp.-gvidantoj kaj por infanoj. Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS
Ingemannsvej 9
Aabyhøj, Danlando.

Post la kursoj aŭtobusa katavano al Haarlem.

(48)

Propono pri Esperanto al la Franca Parlamento.

S-roj Lefranc, Billères, Bricout, Jean-Paul David, Febvay, de Gracia, Liautey, Mallez kaj Schmitt proponis al la Deputitaro:

1. instigi la registaron, tuj enkonduki Esperanton en la programojn de la publika instruado kaj decidi, ke la kandidatoj, kiuj petos esti demandataj en Esperanto, havu la samajn avantaĝojn kiuj estas donataj al tiuj, kiuj pruvas la konon de iu lingvo;

2. instigi la registaron, studi la manierojn por apliki tiun decidan en la diversaj instrugradoj, konsiderinte la naciajn bezonojn tiel kiel tiujn de la popolo kaj de la ĝenerala kulturo;

3. instigi la registaron, proponigi al la proksima kunveno de UNO, tiel kiel al la Eŭropa Konsulta Asembleo, la uzon de Esperanto kiel lingvo de universala interkomunikado.

Esperantisto elektigis parlamentano kaj fariĝos 50-jara.

S-ro Einar Dahl, la konata sveda samideano, nia „stentoro“, nia „vivanta laŭparolilo“, kiu dum du jardekoj iluminis la universalajn kongresojn per sia bonhumoro kaj sia talento, kaj kiu samtempe estas ŝatata komitatano de UEA, elektigis la 1-an de januaro 1954 ano de la Sveda Parlamento, kaj la 1-an de marto li fariĝos 50-jara. Ni esprimas al s-ano Einar Dahl niajn korajn gratulojn pro ambaŭ okazoj; sed ni kredas, ke la sveda esperantistaro kaj la tuta Esperanto-movado estas ne malpli gratulinda ol la nova parlamentano kaj kvindek-jarulo mem.

Universala Esperanto-Asocio (UEA) havis en 1953 proksimume 700 membrojn pli ol en 1952. Ĉu ankaŭ vi, kara legant(in)o, jam aliĝis por la kuranta jaro 1954?

Baldaŭ aperos la dua aŭstria Esperanto-poŝtmarko.

Okaze de la Aŭstria Jubilea Esperanto-Kongreso (5.-8.6.1954), pri kiu ni anoncis en nia numero de 1.3., eldonos la aŭstria poŝt-administracio, kies ĝen. direktoro, sekcia ĉefo D-ro Karl Dworschak, estas honora prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, novan Esperanto-poŝtmarkon (jam la duan). Krome ĝi starigos specialan poŝtoŭtejon kaj stampos la poŝtaĵojn per speciala kongresa poŝtostampo. Estas eldonotaj specialaj „unuatago-kovertoj“, kiuj estas riceveblaj, kun la Esperanto-poŝtmarko kaj kongresa stampo, kontraŭ alsendo de unu respond-kuponeto al: Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien XV, aŭ al: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I. Mendoj estas plenumebaj nur, se ili alvenos antaŭ la fino de majo.

La LKK atentigas, ke eksterlandaj gesamideanoj estas kore invitatitaj partopreni la kongreson, kaj ke ili ne pagas kongresan kotizon. Rekomendinde estas, ke ili sin anoncu senprokraste kaj mendu konvenan notojon.

La Svisa Esperanto-Tago.

Kiel unua el la naciaj asocioj, Svisa Esperanto-Societo havis sian jarkunvenon en la mezo de marto. La 13.3. kunvenis vespere 45 personoj en la „verda“ hotelo Métropole en Bern por aŭskulti altnivelan paroladon de D-ro W. Perrenoud pri la kultura signifo de Esperanto kaj por poste pasigi amuzan vesperon.

La laborkunsido okazis en la sekvinta mateno sub la prezido de H. Herrmann. El lia jarraporto estas menciinde, ke la kolekto de subskriboj de gravaj societoj por subteni la favoran rilaton de la svisa delegacio en Montevideo al Esperanto ĝis nun atingis pli bonajn rezultojn ol la Centra Komitato de SES mem esperis. La kunveno decidis donacon de 150 frankoj al la fonduso Montevideo kaj akceptis budĝeton de 3100 frankoj. La komuna eldono de „Svisa Espero“ kun la organoj de la belgaj, flandraj kaj nederlandaj societoj estis aprobata. Kiel nova prezidanto de SES estis elektata D-ro W. Perrenoud, 13 fbg. Gare, Neuchâtel. Oni informiĝis, ke la svisaj fervojistaj esperantistoj organizos la kongreson de sia internacia federacio en majo 1955 en Zürich. SES konsentis al ili deficitgarantio de 300 frankoj. Laŭ instigo de la Berna Popola Altlernejo, kiu partoprenis lastan vintron en la koordinitaj kursoj, SES organizos en la lasta semajno de aŭgusto ferian kurson en kastelo Münchenwiler; la maksimuma nombro de partoprenantoj estas 40.

La ĝenerala kunveno de SES finiĝis per komuna tagmanĝo. A. B.

Tadros Megalli:

60.000 aŭskultantoj en tri jaroj.

Kun trimonata intertempo en 1951, kiam li estis en Aŭstrio, kaj kun kvarmonata intertempo en 1952, kiam li estis en Francujo (en ambaŭ landoj sen la atendita sukceso), Tadros Megalli jam ekde la komenco de la jaro 1951 prelegvojaĝas en Germanujo.

La unua serio ampleksis 60 prelegojn, kiujn vizitis pli ol 12.000 personoj; la dua serio ampleksis 75 prelegojn, kiujn vizitis ĉirkaŭ 14.000 personoj. Ĉi tiujn prelegojn Megalli faris en Esperanto. De septembro 1952 ĝis la fino de decembro 1953 li faris proksimume 230 prelegojn, kiujn ĉestis ĉ. 35.000 personoj, precipe ĝejnuloj kaj studentoj. Ĉi-lastaj prelegoj estis preskaŭ ĉiuj en la germana lingvo, kiun Megalli estis lerninta intertempe, kaj plejparte aranĝitaj de ne-esperantistaj organizaĵoj. Sed ĉe la fino de la prelegoj li parolas ankaŭ pri Esperanto kaj kutime vendas lernolibrojn kaj ŝlosilojn. En 1953 li vendis pli ol 200 lernolibrojn kaj 2000 flugfoliojn „Esperanto auf einem Blatt“ (Esperanto sur unu folio). Liaj prelegoj okazas plej ofte en popularaj universitatoj, gimnazioj, popol-lernejoj, ĉe junular-organizaĵoj ktp. La prelegoj traktas pri „Egiptujo, de faraono Keops ĝis ĝeneralo Nagib“ aŭ pri „La arabaj landoj, Palestino, Sirio kaj Libano“; ili estas akompanataj de koloraj lumbildoj kaj de muzikaj. La germanaj populuniversitatoj pagas honoraron de 40-50 markoj por ĉiu prelego kaj la vojaĝkostojn, en lernejoj la lernantoj pagas po 0.20 mk.

Esperanto en Hungarujo.

Kvankam en Hungarujo nuntempe ne ekzistas Esperanto-movado, tamen vivas ankoraŭ granda nombro da esperantistoj. Foje okazas kurso. Ekzemple, s-ano Imre Vágó en Pécs instruas Esperanton al dekduo da gimnazianoj. „La tuta lernejo ŝatus lerni ĝin,” li skribas, „sed nature mi ne havas tempon instrui tricent geknabojn.” Heroldon li „foje ricevas, foje ne ricevas”. Sed „ĉiam estas al mi kaj al miaj ĝelernantoj ĝojo ricevi la gazeton vian”. Ankaŭ la libro „Miru, Pensu, Ridu!” bone atingis lin, kaj kiam li „havas etan tempon”, li „miras, pensas kaj ridas. Eĉ ridas miaj ĝelernantoj ankaŭ. ... Mi tre dankas al vi la gazetojn. Kaj tre dankas al la nekona samideano kiu ebligas, ke mi ricevu ĝin.”

Fine de aŭgusto venu al Italujo

por partopreni la 26-an Italian Esperanto-Kongreson en Sassari (eksterlandanoj ne pagas kongreskotizon). Jen la programo: 24.8. vizito al la urbo Sassari kaj interkona vespero; 25.8. solena malfermo; ekskurso al hispandevena urbo Alghero kaj ĝiaj grotoj; vespere regalo de la urbestro kaj balo; 26.8. atm. kongreslaboroj; ptn. dua urbestro-regalo; vespere arta, distra kaj ĥora vespero; 27.8. atm. laboroj; ptn. laŭvoia ekskurso al Bunnari kaj Osilo; vesp. regalo de la provinccentro kaj oficiala balo; 28.-29. ekskursoj al Saccargia, Torralba kaj Nuoro: tie grandioza folkloro rajdado („cavalcata sarda”) kaj solena fermo. Pli detalaj informoj haveblaj de la prezidanto de la LKK, Prof. Martellotta, Casella Postale 58, Sassari (Sordegna).

La Viena urbestro

partoprenis esperantistan kunvenon.

La Viena urbestro, s-ano Franz Jonas, partoprenis la 10.3. la ĝeneralan kunvenon de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, kiun ĉeestis pli ol 120 Vienaj kaj liglandaj gekamaradoj kaj gastoj. Post bonven-saluto de la ASLE-prez. D-ro Grimme kaj recito de salutpoemo alparolis la Viena urbestro esperantlingve la ĉeestantojn, klarigante la neceson de Unuigitaj Statoj de Eŭropo kaj la diversajn ĉi-riate estiĝintajn ekonomiajn, kulturajn kaj lingvajn problemojn. Je la fino de siaj interesaj vortoj li alvokis la esperantistojn al plua aktiveco kaj sugestis al ili, pli intensigi la publikan propagandon kaj la praktikan aplikadon de Esperanto.

Miru, Pensu, Ridu!

La plej interesa libro originale verkita en Esperanto

Kredu min, Sinjorino!

Epizoda romano originale verkita en plej viva Esperanto

Ambaŭ libroj kostas egalvaloron de po 5.40 guldenoj, plus sendkostoj. Mendu ilin okaze de la Tago de la Originala Esperanto-Literaturo ĉe via Libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo „Heroldo de Esperanto” en Scheveningen, Nederlando.



Francaj esperantistoj sciis labori kaj festeni.

Perpignan, en la suna sudo de Francujo, ne tre malproksime de la hispana limo, estas konata por sia vigla Esperanto-vivo. Tie la animo de la movado estas nia fervora samideano René Liech Walter, vicprezidanto ĉe Franca Esperantista Unio (france: UEF). Perpignan'aj esperantistoj sciis labori por nia afero, sed ili sciis ankaŭ festi kaj festeni. Nia foto montras partan vidaĵon de la festeno dum „Tago de Esperanto”, aranĝita antaŭ nelonge en la nomita urbo.

HEROLDO

DE ESPERANTO

Duonmonata internacia organo de
la Esperanto-movado

Eldono: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.
Aperas principe dufoje monate, sed dum la somera sezono unufoje monate.
Redaktoro: T. Jung. — Jarabono 4.— dolaroj

Oni pagu la kotizon al D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37

SINJORO NEZORGEMULO

Originala Novelo de Jodoso

La klientoj de la fervojo en nia malgranda urbo neniam vere plendis. De fojo al fojo tiu aŭ alia vojaĝonto grumbliis pro la malrapida maniero de Sinjoro Bokli dum la plenumo de sia tasko ĉe la ĝiĉeto kie li vendis al ili la vojaĝbiletojn. Tro ofte la vojaĝontoj atendis ĝis la lasta momento antaŭ la alvenhorro de pasaĝertrajno, tiam ili alkuris la stacidomon kaj, spiregante, nervturmentite, manbatis ĉe la biletfenestreto.

"Aj! Aj! Bileton, bonvolu! Rapidu, aŭ mi mistrafos la trajnon!"

Kiel studento de la telegrafmetio, mi, deksepjarulo, ofte observis tiujn scenojn kaj ne malofte trovis ilin amuzaj. Ne ĉe la komenco de mia studentdeĵoro kun Sinjoro Bokli, tute ne! En tiu frua tempo de mia konateco kun Sinjoro Bokli eĉ mi suferis maltrankvilon pro simpatio kun iu vojaĝonto kiu frapegis ĉe la fenestreto dum la bruoj de alvenonta trajno jam sonadis laŭlonge de la reloĵ eksterre, kaj la fajfado de la lokomotivo fajfegis sian signalon de alveno.

Dum tiaj okazajoj Sinjoro Bokli sidis ĉe sia telegrafinstrumento kvazaŭ aŭskultante al ĝi, aŭ eble li trankvile elrigardis la fenestron al la sunbrilo aŭ al la signaltabuleto pendanta tie ekstere super la reloĵ. Tiu tabuleto, kvazaŭ fingra montrilo, donis la signalon al la gvidisto de la lokomotivo ke li haltu ĉe nia stacieto por pasaĝero. La kompatinda, tre ekscitita vojaĝonto, aŭdante la bruon de la rapide alvenanta trajno, ree kaj ree frapegus, kun kreskanta frenezeco, lia kolero kontraŭ la ŝajne malatentema biletvendisto jam preta por eksplodo.

Tiam, je la lasta momento, Sinjoro Bokli stariĝus, turmentegite trankvila, kaj malrapide irus al la ĝiĉetfenestreto, demandus kviete de la furioze ekscitita kliento kien li volas iri, lerte sed ankoraŭ malrapide vendus la bileton, kvazaŭ distrate farus la monŝanĝon dum la nun preskaŭ svenanta vojaĝonto retenis la spiron prepare por elalti de la stacidomo al la ĵus haltigita trajno.

Estis post eble tri monatoj de mia studentdeĵoro kun Sinjoro Bokli antaŭ ol li donis al mi klarigon kiu ebligis al

mi kompreni kaj eĉ amuziĝi ĉe tiaj ofte frenezigaj okazintaĵoj.

"Mi neniam perdis, per morto ĉi tie en la stacidomo, iun ajn klienton", li penseme deklaris al mi tiun tagon post speciale turmentplena sceno. Tiujfoje mi estis certa, ke la vojaĝonto ne atingos la trajnon antaŭ ĉi ties ekforveturo. Tamen, la vojaĝonto suprensaltis de la perono al la ŝtupareto de la lasta vagono de la trajno ĝuste en la momento de ekforiro.

"Verŝajne," Bokli daŭrigis sian klarigon al mi, "mi neniam sukcesos konvinki ĉi tiujn nervemajn klientojn, ke ili ne devas streĉi siajn nervojn pri io ajn. Ili nur kreskigos ulcerojn en siaj stomakoj. Rigardu al mi—kvindekjarulo—neniam malsana eĉ unu tagon dum mia vivo. Mi ne permesas ion ajn plenigi min de zorga streĉado. Neniam ekscitiĝu, junulo, kaj ne permesu aliajn personojn ekscitiĝi vin. Ĉiam trankvilo en la vivo estas mia filozofio."

Li vere estis sana, forta, trankvila homo. Eble iom egoista, ĉar li estis fraŭlo. Mi suspektis, ke li timis la devojn de familio, ke ili disrompus lian trankvilon, pruvus lian filozofion falsa.



Sed venis la tago, je semajnfino, kiam li invitis min viziti kun li "la etan virinon". Tiu "eta virino" estis lia okdekjara patrino. Ŝi loĝis en la naskiĝvilaĝo de Bokli, sur alia fervoja linio, kvindek mejlojn for de nia urbo de kvin mil loĝantoj. Mi memoris ke unu fojon, je la komenco de mia lernaddeĵoro ĉe Sinjoro Bokli, lia patrino estis paciento dum mallonga tempo en nia urba hospitalo kaj Bokli vizitis ŝin ĉiuvespere post sia laborddeĵoro. Je tiu frua tempo mi ne bone konis la karakteron de Bokli.

Kiam mi iris kun li por viziti lian patrinon en la malnova Bokli-hejmo, mi rimarkis la kortuŝantan, ĝentilan amon inter tiu sola filo kaj lia maljuna panjo. Antaŭ ol ni reveturis al la urbo tiun vesperon mi sciis, ke la sola zorgo en la vivo por Sinjoro Bokli estis tiu "eta virino". Post tiu tago mi multe pli respektis kaj admiris mian amikon kaj instruiston. Mi povis amuziĝi kiam la malfruuloj venis frapante al la ĝiĉetfenestreto, kaj mi volis imiti la filozofon, Bokli, pro lia trankvila mieno kaj agadmaniero. Certe li, laŭ mia juna juĝo, vivis longan, trankvilan kaj feliĉan vivon.

Mi estis progresinta en la telegrafmetio sufiĉe por deĉifri la Morse-ajn signalojn tutfacile, sed Bokli ankoraŭ ne permesis min ricevi la oficialajn komunikadojn. Nia urbo ne havis specialan telegrafoficejon. Krom la oficiala fervoja telegrafado, Sinjoro Bokli devis sendi kaj ricevi la privatajn telegramojn. La granda privata kompanio, Western Union, kiu prizorgas la komercajn kaj privatajn telegramojn en Usono, kontraktas kun la fervojaj kompanioj, ke ties telegrafistoj en malgrandaj stacioj prizorgu la malmultajn telegramojn. Okazas, ke la fervojaj telegrafistoj ofte estas tro okupitaj per fervojaj devoj por tuj respondi kiam alia oficejo vokas por sendi privatan telegramon. Se la telegramo estas de speciala urĝeco, la vokanta telegrafisto, ripetante la alvokon kelkfoje; aldonas "URĜA!" por akiri pli rapidan akcepton. Tro ofte tiu kutima signalo estis misuzata, kaj la malpacienca sendonto aldonis "URĜA!" kiam ne estis vera urĝeco.

Nu, por vojaĝi tien kaj reen al la hejma vilaĝo de Sinjoro Bokli, oni devis ŝanĝi ĉe transira stacio tridek mejlojn for de nia urbo. Ankaŭ, la telegrafisto ĉe la fervoja transira stacio ricevis kaj resendis telegramojn de unu linio al alia, sen perdi la tempon por sendi tiujn al la pli malproksima interŝanĝoficejo de la Western Union. Tia arango tro ŝarĝis la telegrafiston ĉe la transira oficejo de la du fervojaj linioj, kaj li, je okazoj kiam li devis prizorgi la privatajn telegramojn, tro ofte misuzis la "urĝan" signalon. Kelkfoje dum la pasinteco, li misuzis ĝin por allogi Sinjoron Bokli al la komerca metalfadeno, kiu estis aparta de la oficiala fervoja metalfadeno. Tia misuzo speciale ĉagrenis Sinjoron Bokli. Pro tio, li kutime malatentis tro ofte la vokojn de tiu telegrafisto tiel longe, ke eĉ la ĉefa telegrafisto de la fervojo devis voki al Bokli kaj ordoni lin respondi.

Tio okazis denove tiun griznuban, malvarman novembran tagon kiam Sinjoro Bokli forgesis sian filozofion. Mi jam estis aŭdinta la nervozan, tre rapidan vokon de la komenco, kaj de la unua voko la vokanto plej rapide signalis, "URĜA!" kaj poste li aldonis la raran superurĝan signalon, "MORTO!" Ĉagrene, Bokli grimacis al mi, kaj sidis trankvile, duonkuŝante en sia

seĝo, elrigardante la fenestron al la neĝplenaj nuboj. Tiu signalo de "morto!" vere maltrankviligis min ĝis mi petis permeson por mem respondi kaj akcepti la telegramon.

"Ne, junulo," Bokli respondis. "Lasu lin lerni sian lecionon, ke la tro ofta voko de 'Lupo!' fine eluziĝas. Trankviliĝu!"

Finfine, kiel mi nervstreĉe atendis, venis la voko per la fervoja metalfadeno de la ĉefa telegrafisto: "DA, DA!", kiuj estis la vokliteroj por nia stacio. Bokli, ankoraŭ duonkuŝante en sia seĝo, etendis sian manon, flegme malfermis la ŝlosilon kaj respondis, "DA".

"Serioza, tre urĝa telegramo por vi, DA, sur la komerca metalfadeno; respondu tuj!" estis la ordono.

Bokli palpebrumis al mi kaj finfine respondis al la nun freneze, rapide vokanta telegrafisto ĉe la transira stacio.

"Pro Dio!" la vokanto literigis perfadene fulmorapide, kaj tuj komencis sendi la telegramon: "Hospitalo Sankta Luko, DA. Atendigu tuj ambulancan ĉe la fervoja stacio por ricevi severe bruligitan pacienton alvenantan per speciala rapidtrajno. Nomo de paciento Velma Bokli, aĝo 80. D-ro Snell."

Sed Sinjoro Nezorgemulo Bokli ne finskribis la lastajn du vortojn de la telegramo, nek la subskribon. Li elsaltis de sia seĝo, suprenstumbulis paperkorbon kaj ekprenis la telefonaparaton ĉe la muro. Furioze li sonorigis per la malnovmoda instrumento, kaj kiam la telefonistino finfine respondis, li kriegis: "Rapide, rapide, Hospitalo Sankta Luko! Rapidege, rapidege! Pro Dio, ne perdu momenteton!"

Mi devis finskribi la lastajn vortojn kaj la subskribon de la telegramo kaj doni la laŭkutiman "OK" al la sendinto, kaj tiam li aldonis pluan klarigon al mi dum Bokli furioziĝis ĉe la telefonaparato. Tiu klarigo estis: "Mi klopodis dum duona horo kontakti vin. La speciala trajno transiris al via linio antaŭ dudek minutoj kaj devos baldaŭ alveni ĉe vi."

Dum la sekvintaj minutoj Sinjoro Bokli similis al sovaĝa tigro nove enkaĝigita. Li preskaŭ disrompis la pordojn de la stacidomo, elkurante por ekrigardi laŭ la fervojaj reloj por la atendata speciala lokomotivo kaj, ĉirkaŭsvingante sin, laŭ la strato por la

ambulanco; tiam ree enkurante al la telefonaparato, kie li denove kaj plej freneze vokis la hospitalon.

La lokomotivo finfine fajfegis de malproksime kaj rapide, kun krakantaj bremsoj, alvenis; sed la ambulanco ne jam aperis. Bokli ĉirkaŭdancis la portilon kiam Kuracisto Snell kaj liaj helpantoj zorge elportis de la vagono la blanktuke kovritan pacientinon. La vizaĝo kaj brakoj de Sinjorino Bokli estis ĉirkaŭvolvitaj per bandaĝoj. Oni povis vidi nur la ŝlositajn okulojn de la suferantino, kaj kiam ŝia filo kriis, "Mama! Mama! Kiel vi estas, Mama?" la maljunulino nur duone malfermis la okulojn kaj alrigardis sian filon kvazaŭ nekonante.

Post dek minutoj la ambulanco alvenis, kaj post kelkaj horoj Sinjorino Bokli mortis en la hospitalo. Eble ŝi estus mortinta eĉ se la ambulanco estus estinta tie ĉe la stacio kiam ŝi alvenis. Pri tio eĉ la kuracistoj malcerte opiniis, sed ne Sinjoro Bokli. Post la enterigo li revenis al sia deĵoro ĉe stacio "DA". Mi tuj vidis la malsanan brilon en liaj okuloj kaj agadmaniero. Li malofte parolis. Se iu vojaĝonto frapetis ĉe la ĝiĉetfenestreto, li eksaltis kaj per nervplenaj, tremantaj movoj, servis. Se venis voko, "DA" per la komerca metalfadeno, li preskaŭ falis ĉe la tablo por respondi.

Post iom da tempo la fervoja kuracisto ekzamenis lin. La lastan fojon kiam mi vizitis mian kompatindan amikon, Bokli, en la frenezulejo ĉe malproksima urbego, li ankoraŭ imagis sin en telegrafoficejo, kaj de fojo al fojo, li elsaltis el sia lito por respondi al imagita voko de "DA".



Ĉu Vi Povas Helpi?

ELNA urĝe bezonas materialon por ekspozicioj. Multaj publikaj bibliotekoj, ktp. bonvenas ekspoziciojn pri Esperanto, sed la lokaj aktivuloj ne havas taŭgan materialon por elmontri. Se vi povas helpi al la kreado de vagantaj ekspozicioj, skribu al Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Ore; aŭ Helene Wolff, 2944 Clay St., San Francisco, Cal.

The Story of the "Spesmilo"

In 1907, at its 36th session, the Association Française pour l'Avancement des Sciences adopted the Speso as the basis

However it remained for Herbert F. Hoveler, originator of the famous Esperanto "keys" (perhaps better known under his pseudonym "E. Ĉefeĉ"—from the

pronunciation in English of his initials—) to put the spesmilo to practical use for the benefit of Esperantists. In 1907 Hovel established in London the unique institution, the *Ĉekbanko Esperanista*. All accounts were kept in spesmiloj, the value of which was fixed at 2.003 English shillings. Depositors were charged one and a half Sm for a book of 25 checks and a book of 50 "transpagiloj". This small charge covered the cost of printing and



detrançu tie ci-

A



Esperanto Numerals: unu = 1, du = 2, tri = 3, kvar = 4, kvin = 5, ses = 6, sep = 7, ok = 8, naŭ = 9, dek = 10, cent = 100, mil = 1000. Dekdu = 12. Dudek = 20. Tridek sep = 37. Okcent kvar = 804. Mil kvarcent naŭdek du = 1492.

the one-penny tax stamp, obligatory on all British checks. The checks were negotiable at any bank throughout the world, at the equivalent value in English pounds. The "transpagiloj" were negotiable only between depositors and the Ĉekbanko and thus required no stamp.

The Ĉekbanko was an immediate success. A great many active individuals and practically every Esperanto publisher, book-dealer and organization had accounts with the bank. By 1914 there were 730 account-holders in 320 places in 43 different countries. There were 36 in the U. S. A. The writer was one of the bank's customers, and used the checks and transpagiloj throughout 1911 and 1912 in nearly every country in Europe. He has a few of the transpagiloj left, and if any ELNA member collects such items he may write for one (while they last).

The First World War greatly hampered the bank. On the death of its founder in 1918 it was liquidated. For a number of years, however, Esperantists had enjoyed a most remarkable and inexpensive means of making large or small payments abroad. Book-lists, subscriptions, membership dues in the international organizations, and, during the Esperanto Congresses, even restaurant menus, were all priced in spesmiloj. The transpagilo, post-card size and requiring only post-card postage, was both order and payment. The recipient detached the coupons and simply mailed them to London for deposit.

TRANSLATION CONTEST

Following is the winning entry to the contest announced in the Jan.-Feb. issue. Also on this page is one translation of the poem "A Psalm of Life" which was originally chosen for the contest (Nov. 1953) but for which no suitable entries were received.

Sukceson Plej Estimias

Emily Dickinson (1830-1886)

Tradukis Wm. Auld, Glasgow, Skotlando

Sukceson plej estimias
Kiu mem ne sukcesas.
Por taksi la nektaron
Urĝa soif' necesas.

Neniu el l' arme' purpura,
Kiu la flagon kaptas,
Difinon de la venko,
Tre klaran, traperceptas,

Kiom vundit' mortanta,
Al kies fremda aŭdo
Turmente, klare, ondas
Fora triumf-aplaŭdo.

The article by S-ano Adams on poetry translations has been held over to the next issue due to lack of space.

Psalmo de la Vivo

Henry Wadsworth Longfellow

(Reprinted here by kind permission of S-ano M. C. Butler from the forthcoming Fourth Edition of *Himnaro Esperanta*.)

Ne aŭdiĝu plenda vorto:
"Vivo estas nur songaĵ'";
Dormo estas kvazaŭ morto!
Agu laŭ la realaĵ'.

Ĉar la vivo ne finiĝos,
Ne la tombo ĝia lim':
"Polvo vi, kaj repolviĝos"
Ne diriĝis pri l' anim'.

Nek plezuro, nek sufero,
Estas nia fina cel';
Sed per vivo sur la tero
Proksimiĝi al ĉiel'.


Meze de la vivomaro,
Tondro de la mondmilit',
Ne similu al ŝafaro!
Estu forta la spirit'.

Ne revadu pri la sorto;
Pasintecon lasu vi:
Agu laŭ la nuna forto!
Vin de supre helpas Di'.

Vivoj de granduloj diras,
Kiel povas ankaŭ ni
Lasi, kiam ni foriras,
Postesignojn tie ĉi:

Signojn, kiujn eble frato,
Vojaĝante en dango',
Ŝipperee dronigato—
Vidos ĝoje kun esper'.

Ni agadu, do, konstante,
Estu kia ajn la sort':
Celadante, plenumante,
Laborante, ĝis la mort'.



For many years I have been bewailing the lack of a really good textbook for class work. There are many good textbooks, but most of them are ill suited for classes, or too expensive, or out of print.

Now there has come into my hands a new book, *The Esperanto Teacher*, by Mason Stuttard, which I am glad to be able to recommend very warmly to teachers of Esperanto classes. Mr. Stuttard is a well known Esperantist, author and translator, now holding the office of Konstanta Kongresa Sekretario of the U.E.A.

I am not too well pleased with the author's examples of the pronunciation of the vowels, but I know that it is difficult to represent these by English examples, and in any case the student will learn to pronounce from the example of his teacher.

This book can be obtained for fifty cents, postpaid, from the Esperanto League Book Service. Teachers will make no mistake in adopting it for the use of their classes.

W. G. A.

ESPERANTO LEAGUE'S BOOK SERVICE

Middleton, Wisconsin

Esperanto for Beginners, Butler	.10
Robbie's Home Student.	
(Recommended for quick course)....	.25
Nelson's Esperanto Course, (Complete university grade grammar and exercise book. Highly recommended.)	1.50
Step by Step in Esperanto, Butler. (Equally good as Nelson's, but different in arrangement.)	1.50
Esperanto Grammar and Commentary, Cox. (Very good.)	1.50
Eng. - Esp. Vocabulary. (Not exhaustive.)	.05
Eng. - Esp. Keys. (Over 800 basic words. Good handouts.)	.05
Millidge Esperanto - English Dictionary	2.50
English - Esperanto Dictionary. Fulcher-Long.	2.35
Edinburgh Esp. Eng. - Eng. Esperanto Pocket Dict., highly recommended as a handy, dependable quick reference. .85	
Plena Vortaro. (Complete all-Esperanto Dictionary.)	4.00

NORD-AMERIKA MODERNA MUZIKO

De Elwyn C. Pollock



Unua Movimento (Allegro con Brio)

Estante tipa junulo de la grandurbo, unu kiu povis "zorgi pri si mem", kio ajn okazus, George Gershwin posedis unu el la plej kortusaj melodiaz talentoj inter ĉiuj la "kantistoj" en Ameriko, kaj estis la komponisto de granda nombro da muzikkomedioj, revuo-sukcesoj, ktp. Li naskiĝis en Brooklyn, Nov-Jorko, la 26an de septembro, 1898. Kiel junulo li studis la pianon kaj la harmonion, kaj, je la aĝo de 16, posteniĝis ĉe J.H. Remick kaj K-io kiel disfamigisto por kantoj. Li baldaŭ komencis mem komponi kantojn, kaj tiel komenciĝis kariero de rimarkinda brileco. George Gershwin pruvis en la propraj elfaraj, ke la pli bonaj elementoj de ĝazo povus esti enkorpiĝitaj en artmuziko kaj tiel fariĝi la bazo de serio de simfoniaj kreaĵoj tipe esprimoplenaj pri nia nacio.

Eble la 12a de februaro travivis nenian specialan muzikan signifon, sed por tiuj, kiuj inklinas al la retrospekto de amerika muzikloro, ĝi certe estis tago plena de signifo. Kiel vera prototipo de indiĝena komponaĵo, la *Rapsodio en Blu'* jam trapasis sian 30an jaron de publika favoro.

Por tiuj, kiuj, tra la jaroj, kutime akceptas la *Rapsodion* kiel laŭdan memoraĵon pri amerika vivo, certe interesos la fakto, ke George Gershwin komponis ĝin dum ĝuste dek tagoj! Kiel ĉiuj muzikamantoj bone scias, estis Paul Whiteman kiu instigis lin, kune kun la talentoj de Victor Herbert kaj Ferde Grofe, al la ideo aranĝi programon kiun akceptos la tiam "Sankta el Sanktoj", nome "Aeolian Halo". Pro tio, ke oni konsideris la daton signifa, la 12a de februaro estis fiksita. Tio lasis al Gershwin nur 24 tagojn por pensi kaj komponi. Kiam finiĝis la pensado, restis

nur dek tagoj por la komponado! Ili estis tamen, por parafrazi ion diritan pri la rusa revolucio, la dek tagoj kiuj ekskuis la ĝazmondon! (Ferde Grofe speciale preparis la *Rapsodion* por orkestro.)

Neniu sciis kion atendi kiam la mal-dika, eleganta kaj ĝentilaspekta Gershwin sidigis ĉe la piano por ludi sian parton. La ekscita kaj senprecedente longa glisando en la malferma kadenzo, ludita de Ross Gorman per la klarineto, estis tute nova ornamaĵo, ĝenerale nekutima al la muzik-orelo. Ankaŭ la unuaj frapantaj kaj elstare brilaj pian-aĵoj efikis same ekscite, sed kiam la orkestro troviĝis en la pli trankvila kaj bele melodias parto — la E-majora "Tchaikovskian esprivo" epizodo, en kiu troviĝas la plej atentiga muzika ideo — la fakto, ke Paul Whiteman prilarmis kaj perdis la vojon en la partituro, ne gravis: la muziko nur daŭrigis — kaj finigis en tempesto de aplaŭdo! Ĉio ĉi antaŭ 30 jaroj! Certe interesos, ĉirilate, ke iuj komence kritikis ĝin kiel raŭka kaj vulgara, dum hodiaŭaj kritikistoj rekonas ĝin kiel unu el la plej fundamentaj ĉefĝistoj de amerika folkloro muziko! Kompreneble ĝi ne estas perfekta komponaĵo; malfortecoĵ ja ekzistas. Sed ĝuste kiel sentiskaj esprimis sin fama pola kuracisto antaŭ tiu ĉi jarkomenco, George Gershwin klarigis en akra konstato, post demando pri iuj el la malfortaj sekvaĵoj, "Mi ne scias. Ŝajnas, ke la popolo ĝin ŝatas kiel ĝi estas." Ĝuste dirite; la popolo ja ĝin ŝatas, dum 30 jaroj!

Pri larilato de ĝazo al amerikamuziko, oni trovas, ke la granda muziko de la pasinteco en aliaj landoj estis ĉiam komponita laŭ indiĝena aŭ folkloro muziko. Tio ĉi estas la plej forta fonto de muzika fekundeco. La plej bona muziko nuntempe komponata sammaniere devenas. En nia vasta lando ekzistas multaj kaj diversaj fontoj de la folkmuziko, ĉiuj havante validecon kaj fundamenton por la evoluado en artmuzikon. Tial estas eble, ke diversaj distingaj stiloj evoluigu en Ameriko ĉiujn naskitajn folkkantojn de diversaj lokoj. Negro-spiritalaĵoj, sudmontaj kantoj, kampara violonado

kaj "Cowboy" kantoj povas esti uzataj en la kreado de amerika artmuziko kaj ja estas uzataj de multaj hodiaŭaj komponistoj, kiel ekz. Aaron Copland. La "Konĉerto en F" estas esence individua kaj nacieca. "Amerikano en Parizo" estas viva kaj natura karakteriziĝo de nia popolo: konfidema, bolanta, plejparte gaja. kaj eble iomete paradema.

"Porgy kaj Bess" estis prezentita dum 1935 de la "Theatre Guild" de Nov-Jorko ĉe la "Alvin Teatro", kie oni prezentis 124 fojojn. Ĝia sceno okazas ĉe "Catfish Row", kvartalo de Charleston, S.C., kie la aristokratoj unue loĝis, sed, dum la tempo de la rakonto, la situo de negro-tenementoj. Eble ĝi ne estas "grandopero" en la vera senco de la esprimo (oni diras, ke la tute negra ludantaro troviĝas ĉe la kontraŭa fino de la opero-mondo), sed ĝi certe estas brila, varmsanga, lerta kaj indiĝena peco de amerikanismo. Muzike kaj intrige tiu ĉi verko estas eble la plej proksima alla ideo de moderna amerika folkopero.

Troviĝas distinga Gershwin-tuŝo en ĉio el lia muziko, eĉ en la sentimentalaj kantoj, kaj aliaj, kiujn li komponis por "Broadway" kaj "Tin Pan Alley". Multaj el ili jam fariĝis klasikaĵoj en siaj kampoj; sed el ĉio elstaras la "Rapsodio en Blu'", kiu postlasis mezuron de famo, kiu ne estas "skribit' en Akvo!"

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezento kaj komento de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906—388 paĝoj

2a volumo, 1906-1914—374 paĝoj

Nuna prezo: Ĉiu volumo \$ 2.25

Mendu de:

Esperanto League Book Service
Middleton, Wisconsin

Niaj Membroj

Estas kelkaj gesamideanoj en nia Nord-Amerika movado kies longjaraj oferoj al nia afero meritas por ili la honornomon de "grandul(in)oj" inter ni, speciale kiam ili estas atingintaj la aĝon de 80 jaroj aŭ pli, se rilatas virojn; serilatas la heroinojn de nia movado, ni nemenciu la jarojn, sed nur ke ili atingis la graciozan aĝon de arĝentaj fadenoj inter la oraj. Inter niaj gegranduloj elstaras nia kara samideano, Joseph Leahy.

Joseph Leahy naskiĝis sur farmbieno en Quebec, Kanado, en 1869, kaj restis tie ĝis la 15a jaraĝo. En la jaro 1886, li transloĝiĝis al Usono, kie li okupiĝis dum multaj jaroj en la bicikla kaj, laste, aŭtomobila vendadkomercoj ĝis 1930. Entiu lasta jaro lia antaŭa "amokupo", fotografado, fariĝis lia ĉefokupo en Washington, D.C.

Lerninte Esperanton en 1908, S-ano Leahy daŭre korespondadis kun gesamideanoj tra la tuta mondo. Kiam, en 1933, la E.A.N.A. Estraro devis serĉi oferemulon, kiu estis kaj kapabla kaj preta akcepti la postenon de Sekretario, Leahy akceptis. Je tiu tempo la mondovasta ekonomia krizo estis je la meznokta horo por nia movado kiel ankaŭ por la mondo. La E.A.N.A. membraro estis forfalinta ĝis la plej malalta nivelo. La ŝuldoj estis multaj kaj la rimedoj malmultaj. Malgraŭ ĉiaj obstakloj, S-ano Leahy, post regula elekto en 1934 al la sekretaria posteno, daŭre servadis kiel Sekretario ĝis 1945, kiam la nevenkeblaj malamikoj, pliĝantaj jaroj kaj malsano, pelis lin al la bedaŭrata decido ekŝiĝi. Dum tiuj dek du jaroj kiam li plejparte ne nur servis senpage, sed ofte devis pagi la tag-al-tagajn kalkulojn el sia propra poŝo, li relevis la membraron ĝis proksimume 700.

En 1951 S-ano Leahy ricevis la plej kruelan baton de la sorto. Li vekigis unu matenon por ek trovi ke li nek povas aŭdi nek memori ion ajn. Post longa, amplena flegado de sia kara edzino, kaj la elspezo de multaj dolaroj ĉe kuracistoj, li resaniĝis sufiĉe por akcepti la bonkoran inviton, jam longe rifuzitan, transloĝiĝi al la hejmurbo de parencoj de S-ino Leahy en Watertown, en Ŝtato Nov-Jorko. Tie li nun sufiĉe refortiĝis por denove entrepreni malgrandan korespondadon kun malnovaj amikoj, kaj

eĉ aktivigi pri sia "amokupo" iomete. Sed perletero de frua 1954, li bonhumore deklaras:

"Mia 85a naskiĝtago rapide alvenas, kaj mi komencas aŭdi la ŝerenomon, 'Maljunulo', kaj eĉ komencas akcepti la fakton."

Krom aliaj Esperantaj organizaĵoj je kiuj li estas vivdaŭra membro, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, dum la 1953-a Kongreso en Madison, voĉdonis unuanime vivdaŭran membrecon al S-ano Joseph Leahy.

Jodoso.



Joseph Leahy

HOW TO LEARN ESPERANTO

III

Learn by Corresponding

It can not be emphasized too strongly that one of the most practical ways to become a proficient Esperantist in a short time is to take up an active correspondence with Esperantists in foreign countries. Many students hesitate to attempt correspondence until they have finished their course of instruction; but experience has shown that successful correspondence can be carried on after only the first few lessons. If you are a member of a class, or are studying Esperanto by yourself, and have not tried corresponding with foreign Esperantists, try it. Not only will it increase your knowledge of the language, it will afford you a great deal of pleasure as well.

As a matter of fact, Esperantists in many foreign countries are particularly anxious to find "pen-pals" in North America; here is your opportunity to tell others about our country, and to learn more about theirs. The following passages are translated from a typical letter received by the Review-sponsored North American Correspondence Service:

"For your kind reply I thank you from my heart. I am happy that my card did not go without notice. However I hope that in your kind and so distant land there is one Esperantist who will accept my proposal for friendly correspondence. I believe that it is necessary for each Esperantist to perfect his own knowledge of the language; the best way to succeed in this is through active correspondence. I want to correspond also because I want to work actively for the spreading of the language and its ideal. I believe that through correspondence we Esperantists will be able to bring about more and more contacts between nations and thus, slowly but surely, fulfill the great idea of our language—the bringing together in friendship of all the peoples of the world.

"For these reasons it is my great desire to find in your country a friend who will correspond with me."

The writer of this letter had written to the Service asking for an American correspondent. Hundreds of such requests have been received, but few Americans have taken advantage of the Service and, as in far too many cases, NACS director Elwyn Pollock was obliged to reply personally that he was unable to fulfill the request.

Learn by corresponding; for names and addresses write to: North American Correspondence Service, 9079 Madison Ave., La Mesa, Calif.



Esperanto—Second language for all.

The Review for a year—30 cents.

A fine gift for school or library.

Does your favorite Congressman know about Esperanto? Buy him a sub.

PROPOSED AMENDMENTS

(Continued from page 3)

501: To be amended by substituting "April 1st" for "January 1st".

505: To be amended by adding "and ballots" after "envelopes".

601: To be amended by substituting "within six months" for "within three months".

606: Proposed that the following paragraph be added "The Congress shall have power to name as Honorary Members persons who have rendered distinguished service to Esperanto."

607: Proposed that the following paragraph be added "Any ruling by the President and any decision of the Executive Committee or Congress (except purely procedural decisions affecting only the functioning of these bodies) shall be published to the membership. If twenty-five or more members protest any such decision within sixty days after its publication, the decision shall be referred to a referendum of the members within sixty days after such protest. If the vote sustains the protest, the decision shall be withdrawn. If the vote sustains the decision, or if it is not protested as stated above, the decision shall stand as the action of the League. Referendum ballots shall be sent to the members by the Secretary and shall be opened and counted by the Secretary. All ballots and envelopes shall be retained by the Secretary and rechecked at the subsequent Congress by the Tallying Committee."

Article VIII: Proposed that this article providing for By-Laws be eliminated as unnecessary.


Ĉina samideano deziras korespondi kun usonaj gesamideanoj, precipe kun gekomercistoj, Esperante aŭ anglalingve per aerleteroj. Njpre respondos. S-ro Wong Ling Kai, 72, Lockhart Road, 1st Floor, Hong Kong.



Esperanto and Stamps

by Conrad Fisher
RFD1, Meadville, Pa.

In the preceding issue you read of the postage stamps bearing texts in Esperanto which have been issued by Brazil and by several European countries. Many countries have used cancellations in Esperanto. The majority are on mail dropped at the Universal Congresses and the international congresses of SAT, the workers' movement among Esperantists.



Cancellations in Esperanto have also been used to advertise local products. A German Esperanto congress was advertised before-hand with a cancellation in German: "DEUTSCHER ESPERANTO KONGRESS". Mail dropped at national Esperanto congresses have been cancelled with their own handstamp. Several typical cancellations are shown here.



From 1912 until the present at least 123 cancellations bearing Esperanto texts have been used. None appeared in 1915, 1916, 1917, 1919, 1920, 1942, 1943, or 1944.

Esperanto in the N. Amer. Press

The Los Angeles Times for March 8 carried a feature story, with picture, about S-ano Dirk Brink entitled "Man Who Speaks Many Tongues Finds Happiness", and describing the role played by Esperanto in S-ano Brink's experiences during World War II.

The Los Angeles Times also published (Jan. 25) an article about the famous Esperanto family Chomette (see story on page 3).

The Portland (Oregon) Journal published a letter from our active member in Hillsboro, Adrian Hughes. The letter gave a particularly succinct resumé of the case for Esperanto, and included the address of the League where readers were invited to write for additional details. League Secretary Dormont reports that many requests for information have been received as a result of this one item.

The San Diego Evening Tribune printed a letter signed by S-ano I. K. Reed in which Esperanto was recommended as an interesting hobby, particularly since it "provides a means for different nationalities to exchange ideas." In a later issue the paper printed a letter from S-ano Elwyn C. Pollock, director of the ELNA Correspondence Service, in which the fact that Esperantists in foreign countries are eager to obtain correspondents in North America was emphasized.

The Toronto Globe and Mail recently published in its regular column "The Homemaker", by Mona Purser, a feature story about Ges-roj Vilma Eichholz, Esperantists from Czechoslovakia now living in Canada.

Esperanto was also mentioned in The New York Times, The Stockton-Herald, and The Sacramento Bee.

North American Esperanto Review

6205 South Prospect

Tacoma, Wash.

Return Postage Guaranteed

